


SUDFRANCIA STELO

N° 201 - 2a kvaronjaro 2012 - 2^{er} trimestre 2012



Bulteno eldonita de la
Esperanto-Federacio de
Langvedoko-Rusiljono



Enhavo:

- P 2 : novaĵoj el niaj grupoj
- P 6 : Forpasis Marlène Bouman
- P 7 : Kien ni iros ? ; Grésillon
- P 10 : A propos de l'Espéranto
- P 12 : diversaj informoj
- P 14 : Kien ni iros ?, Festival du Rock Castel (26/07- 1/08)
- P 15 : Pech Maho: opidumo en Suda Gaŭlio (unua parto)



JARLIBRO 2012 aperis

La simbolo de la [125-jariĝo](#) de Esperanto ornamas la titolpaĝon kaj la kovrilo de la [Unua Libro](#) de Esperanto la tradician portretan paĝon en Jarlibro 2012 de UEA, kiu aperis la 13-an de junio.

Bonvolu sendi viajn informojn, fotojn artikolojn, kaj novaĵojn al Christian MOURE
15, rue du Verdier 34120 TOURBES xianmoure@orange.fr
Comité de relecture : Josée BOCCADIFUOCO, Marie-Blanche FONDRILLON, Arno LAGRANGE

MONATAJ KUNVENOJ MPT:

12an DE MAJO 2012

Hodiaŭ varmo, atendis nin en la Ĉies Domo ESCOUTAÏRE.

14 partoprenantoj ĉeestis, inter ili Nadia, juna studentino, kiu preparas « Master pri lingvoj ». Ŝi elektis : « la lingvon Esperanto » ! Ĉar ŝiaj geavoj lernis ĝin. Pasintan monaton, ŝi jam partoprenis nian Monatan Kunvenon kaj ni kunvenis por intervjuo.

Do, tuj post la bonveno, senkulpiĝoj kaj kelkaj aliaj aferoj, 5 el ni iris kun Nadia en alian salonon, kie ŝi registris konversacion, kiun ŝi gvidis.

Ŝi, jam preparis la demandojn kaj nia-vice ni respondis, poste, la konversacio plivigliĝis sed laŭ mi ĉiu lasis la alian esprimi sian ideon. Ni esperas kaj deziras, ke ŝi bone atingos sian projekton : Bonan ŝancon al ŝi !

Post preskaŭ du horoj da intervjuo, ni reiris al nia salono, por tagmanĝi, bedaŭrinde du aŭ tri geamikoj, ne restis. Kiel kutime ni foriris je la 14a, pli, malpli. Do, ĝis venonta kaj lasta kunveno de tiu jaro 2011-2012.

16an DE JUNIO 2012-06-19

Jen nia lasta monata kunveno, dum du monatoj, ni ne renkontiĝos, ho, ve! Mi deziras al vi ĉiuj, bonvenon kaj senkulpigas la ne-ĉeestantojn : Jorgo, kiu tutkore salutas vin, same geDumas, Roza.

Unue, Jeannine disdonis la diplomojn al 4 geamikoj : Martine, Olivier, Diane kaj Andreo (Joëlle jam ricevis ĝin jaŭdon, en Escoutaïre, okaze de ŝia datreveno kaj antaŭ ŝia bicikla forvojaĝo al Svedio).

Gratulojn do al novbakitaj diplomitoj! Due, mi parolis pri la nova adreso de la Asocio, jen ĝi :

Centre Culturel Esperanto de Montpellier
219 rue Louis Pergaud app 35
34080 MONTPELLIER

Kaj mi konfirmis, ke la ekskurso, antaŭvidita por ĉi junifino, ne okazinte pro diversaj kialoj, okazos, en junio 2013.

Antaŭvidita estas la Foiro de Asocioj en Montpellier : tiuj kiuj pretos helpi ĝian bonan disvolviĝon, rendezvos komence de septembro por ĝin prepari. Ni ŝatus havi dokumenton klare prezentante Esperanton por disdoni al eventualaj interesiĝintoj al tiu lingvo.

Andreo proponis serĉi diversajn kaj taŭgajn frazojn kaj ĉiu elektos poste, ni vidos ĉu ni printos ilin.

La Asocio ricevis inviton de la urbo-domo por ĉeesti paroladon pri nova loko en EAI (antaŭe kazerno proksime al la centra urbo) kiun aĉetis la Urbo. Tie, estos studentaj loĝejoj, lokoj por Asocioj ?

Do ni vidos ĉu eblos havi salonon por niaj kunvenoj, kursoj... des pli, ke ni sciis, ke venontan jaron, nia rondo pligrandiĝos je du studentoj !!!!

Ni ankaŭ proponis ke eblu havi pli malaltan asocian aliĝtarifon por la studentoj.

Venontan kunvenon post la somerferioj, ni vidos ĉu la varmo sukcesis favori la malriĉulojn !

Tiu estis la fina punkto, kaj kiel kutime sekvis komuna manĝaĵo. Estis iom da emocio kiam ĉiu foriris siaflanken.

Belajn feriojn al ĉiuj kaj ĝis.

* * * * *

RECEPTO :

Kial ĵeti la kosojn de la faboj ?

Jen supo imagita de Serge :



Mi forgesis precizigi la datojn de la Monataj Kunvenoj ĝis la fino de la jaro 2012, jen ili : 20an de oktobro, 17an de novembro, 8an de decembro Pli poste, misciigos la datojn por la jaro 2013.

J. B.

Post formeto de la fabogrenoj kaj senŝeligo de ilia maldika ŝelo, forĵeti la fadenetojn de la kosoj. Friti ilin kaj la maldikan ŝelon, en olivoleo, kun larderoj, cepo, terpomo. Aldoni akvon, kuiri ĉirkaŭ 20 minutojn, poste miksi.

Alia flanke, friti la guŝojn same kun larderoj kaj cepo.

Surtabligi la miksitan supon kun la gusoj por ornami.

Laŭ mi, bonega supo sen desperdo!
Bonan apetiton kaj diru ĉu vi gustumis, kaj ŝatis. J.B.

* * * * *

PIKNIKO EN « LA PLANTADE »

Jen la lastaj tagoj de la lerneja jaro, baldaŭ ni disiros. Dimanĉon la 17^{an} de junio ni kunvenis, 15 personoj en la agrabla parko de la Plantade, ĉe la rivero Orb. Ni taŭge disaranĝis seĝojn kaj longan tablon sur herbejo ombrumita de altaj arboj, inter la baseno kaj la fontano.

Line legis al ni dokumentojn pri la Plantade, ĝia historio kaj la kreinto de tiu belega ĝardeno. Dankon al li : Jean-Marie Cordier.

Sur la tablotuko kuŝis granda kvanto da nutraĵo, kukoj, fruktoj kaj staris

trinkaĵoj. Elektu ĉion, kion vi deziras.



Posttagmeze ni ludas : unue iu priskribas siajn vestaĵojn por voki

unu el ni, poste kun papero fiksita sur la frunto, ni devas eltrovi per demandoj, kiun personon ni prezentas. La roloj estas diversaj kaj sufiĉe malfacilaj, oni povas multe ridi.

La komuna foto sur la ŝtuparo montris al ni, ke la bela vetero estis ege varma, prefere ni estis sub la arboj, kie ni babilis, manĝis, ludis, promenadis.

Ni adiaŭis ĝis septembro, forlasante la parkon, jam pripensante, ke venontan jaron ni povos ankoraŭ



kunveni ĉi tie en plena amikeco.
C.B.E.

* * * * *

IMPRESOJ pri la ŝipado sur la Suda Kanalo.

Estis tute bona tago : la etoso, la vetero kaj la renkontiĝo inter la partoprenantoj de « la Maison de l'Europe de Nîmes et du Gard », « Cercle culturel espérantiste nîmois » kaj « le Cercle Biterrois d'Espéranto ». La unuaj interesiĝis pri Esperanto ĉar, dek jaroj antaŭe, kursoj okazis en Maison de l'Europe. Fakte ili konstatis, ke ni parolis Esperanton kiel nia nacia lingvo. Ili ĝojis, ke Esperanto ne volis superigi aliajn lingvojn. Tiu lingvo nur restas ponto inter popoloj.

Kiam ni veturis ĝis la unua kluzpordo ni demandas : ĉu la ŝipo povas daŭrigi sian vojaĝon aŭ ne ? La ŝipo haltas kaj la kluzpordo malfermiĝas. Tie ni malkovris novan sensaĵon, kiam la ŝipo malsupreniras en la interkluzo. Alia kluzpordo

malfermiĝas kaj la ŝipo daŭrigas sian vojaĝon.

Dum la paŭzo de la kluzisto, ni bone tagmanĝis kaj trinkis bonan freŝan rozkoloran kaj ruĝan vinojn. Samtempe la du grupoj agrable interparolis. Posttagmeze ni ŝatis la kvietecon de la promonado tra la bitera kamparo.

Jen la vorkoj sur la rivero Libron. Estas laŭ diro de la ŝipestro la sola en la mondo. Esperante oni donis al ni bonan klarigon pri la funkciado de tiu impona vorko. Nia promonado finiĝis antaŭ la kluzpordo de la ronda kluzo de Agde, kiu ankaŭ estas la sola en la mondo.

De Béziers al Agde ni povas vidi multajn vorkojn : kluzojn de Fonséranes, pontkanalon sur rivero Orb, vorkojn sur Libron kaj rondan kluzon de Agde.

Fine ni ĝojis, ke ankoraŭ restas laŭlonge de la kanalo multaj arboj, kiuj ombrumas la promenantojn.

Ni multe gratulas Frederic Bourquin por lia rimarkinda laboro kaj lia perfekta organizado.

C.B.E.

* * * * *

Kongreso en Edinburgo de la 20a ĝis la 22a de Aprilo

La kunkongreso de Esperanto kiu okazis en Edinburgo de la 20a ĝis la 22a de aprilo kunigis 86 personojn precipe el Britio sed ankaŭ el Latvio, Hungario, Germanio, Italio, Armenio, Belgio (Antverpeno), Luksemburgo, Norvegio kaj Francio. Vendrede la 20-an, la fruuloj vizitis la malnovan urbocentron kune, gviditaj de juna italdevena edinburgano, Franĉesko Maurelli. Vespere, la organizantoj sin prezentis prelegante, kaj ni aŭskultis sakŝalmiston, t.e. kornemuziston.



La unuan tagon (21), ni aŭskultis matene Istvan Ertl (de Hungara deveno sed luksemburga, li laboras ĉe la eŭropa kortumo de kontoj). Li paroladis pri 'Beletra tradukado al kaj el Esperanto'. Poste, parolado de Marteno Miniĥ, juna londona esperantisto, temis pri 'Enkonduko al neoficialaj stiloj uzataj en Esperanto' (ekzemple diri 'mojosa' por diri

'moderna juna stila', kaj do 'mojoseco', aŭ uzi 'na' por enkonduki la akuzativon). Dume, John Wells, prezidanto de la Esperanta Asocio de Britio, paroladis pri Esperanto por la publiko.



Ni vizitis la Parlamenton de Skotlando, disajnititan de Kataluno, kaj aliaj ankaŭ vizitis la Palacon de Holirood, kiu estas tiu de la Reĝino. Vespere, Istvan Ertl preleegis pri 'Esperanto kaj Eŭropa Unio : ĉu miraĝo, ĉu perspektivo ?' Poste, Jakvo Schram prelegis pri 'Red Star Line : Vojo al Feliĉo ?', tio estas pri la migrantoj al Usono el Antverpeno, kiuj estis ege multaj. Ni aŭskultis poste Franĉesko Maurelli kiu ludis pianon, kaj Rob Hokins ludantan 'La Espero' per sia gitaro. Juna Hungarino parolis pri la radio Muzaiko kiun oni povas aŭskultadi tage kaj nokte; ŝi helpis ĝian kreadon.

Dimanĉon, dum la jarkunvenoj de la britaj organizoj, kelkaj geuloj

eklernis verki hajkojn, mallongajn japanajn poemetojn, poste ni aŭskultadis prelegon pri 'Finvenkismo, raŭmismo, lingvaj rajtoj : kien ni iras ?' (Istvan Ertl), kaj pri 'Roksano, la morgaŭa virino', (far Pol Gubbins aŭ 'Gabbins') tio estas pri heroino de romano far francino, cirkaŭ 1912.

La etoso estis speciale vigla dum komedi-kvizo organizita de Rolf Fantom kun helpo de 4 internaciaj esperantistoj. Ni ankaŭ povis ĉeesti ekumenan diservon en Esperanto.

La postkongreso ebligis al ni viziti la Kapelon Roslin (aŭ Rosslyn) faman pro la legenda 'Graal', kiu fakte ne estas tie, kaj pro la historio de la Da Vinĉi Kodo.

Ni iris al Falkirk vidi la radegon, egan radon kiu prenas boatojn kaj

metas ilin en alian kanalon, el la du kiu kruciĝas tie, je diferenca alto.

La lastan tagon, ekskurso al Glasgovo kaj lago Lomond estis organizita.

Ni eksciis pri la venonta kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio en Irlando, en Julio, ĉe Galivo (Galway) :

<http://www.europo.eu/eo/chefpagho>

Fine, pri Edinburgo, mi konkludos 'dirante' ke estas bela, vere kultura urbo tre vizitata (ĉu ne ?), kaj la urbo de Walter Scott (Ŭalter Skot), la fama verkisto, Jonatan Livingston, esploristo, Robert L. Stevenson (ni konas lin precipe pro sia vojaĝo en la Cevenoj, Dr Jekyll, kaj 'La Insulo kun la trezoro') kaj Simpson (kiu eltrovis kloroforma anestezio).

Lucas Perier

* * * * *

Forpasis Marlène Bouman



Marlène Bouman

Van den Meersschart Gent 30 aout
1943 Knokke-Heist op 22 juin 2012.


La vie est comme la neige
Vous ne pouvez pas garder.
Consolation, c'est que vous étiez là,
des heures, des mois, des années.

Vivo estas kiel neĝo:
konservi ĝin vi ne povas.
Nia konsolo estas via ĉeestado
dum horoj, dum monatoj, dum jaroj...

LA LUAR-KASTELOJ KAJ LA EO-KULTURDOMO

Situation

Grésillon est dans une petite commune située à côté de **Baugé**, petite ville d'Anjou à 250 km au sud-ouest de Paris dans la région des châteaux de la Loire entre Angers, Tours et Le Mans.



DE GRÉSILLON (FR-49150)

Tiu artikolo celas allogi esperantistojn kiuj emas malkovri la imponan kulturan heredaĵon de la regiono de Francio inter du riveroj, Loire kaj Loir, okaze de restado en nia Kulturdomo, jes ja nia kastelo situas je 30 kilometroj de la riverego Loire.

La konstruistoj de la pasinteco en tiu areo profitis de la donacoj de la naturo, nome la ŝtono kalka kvarcglima (france: tufeau) kaj la ardezo blua.

La « Luar-kasteloj » plej ofte originas de fortikaĵoj de mez-epoko.

En Eŭropo de la komenco de la 15a jc., la reĝlando Francio estis ankoraŭ ne firme starigita, eĉ oni povas imagi ke la angla reĝo (la familio Plantagenêts) povus krei imperion en Eŭropo kun Francio kiel propra posedaĵo, tiam la francaj reĝoj ekloĝis en kasteloj de la valo de Luaro, nome Karolo la 7-a en Chinon.



Château de Grésillon



Bienvenue à

Grésillon

**Maison culturelle de
l'Esperanto**

MCE

Château de Grésillon
49150 Saint Martin d'Arcé
France

Tel . +33 (0)2 41 89 10 34

kastelo@gresillon.org

<http://gresillon.org>

société civile coopérative de consommation à capital variable
RCS Angers 49 n°522 621 556

Sekvu la francajn reĝojn « *les Valois* » kiuj restadis en la Luarkasteloj:

1- Vizitu la fortikaĵon de **Chinon** kiu entenas reĝajn loĝejojn kun tipaj fenestroj de la 15a jc., bele finrestaŭritaj antaŭ 2 jaroj.

2- Renkontu Karolo la 8-a en **Langeais** kiu edzinis al Anne de Bretagne en la kastelo en 1491.

Apud Langeais, situas la fama kastelo de **Azay-le-Rideau**, la juvelo de la renesancaj konstruaĵoj.

3- Karolo la 8-a naskiĝis en la kastelo de **Amboise**, konstruigis reĝan loĝejon dank'al italaj laboristoj (komenco de la franca renesanco) kiam li ekregis en 1491 kaj mortis tie pro frapo sur la supra sojlo de pordo! Vi renkontos Leonardon de Vinci kaj la lastan reĝon kiu vivis en Luarkastelo, Francisko la 1-a.

Proksime de Amboise, situas la kastelo de Chenonceaux, nomita la kastelo de la damoj, tie vivis Diane de Poitiers kaj poste Catherine de Médicis.


4- Ludoviko la 12-a naskiĝis en la kastelo de **Blois**, li edziĝis al Anne de Bretagne kiam Karolo la 8-a mortis sen heredanto kaj ili loĝis ĉefe en tiu kastelo. Francisko la 1-a, la reĝo kiu sekvis, konstruigis novan alon en la stilo renesanca.

5- Proksime de Blois, situas la grandioza kastelo de **Chambord**, ne kastelo por loĝi sed konstruigita de Francisko la 1-a por ripozi post ĉasado en la granda arbaro. Provu observi aprojn kaj cervojn tie.

Kaj jen, lernu pri nia esperantista kastelo:

Ĝis la 16-a jc., la bieno estis posedaĵo de la familio Le Bigot, en kiu estis multaj reĝaj oficistoj kaj juĝistoj. La unua nobeldomo estis konstruita ĉirkaŭ 1585 kaj eble videblas fenestro de tiama stilo en la nuna kastelo.

Kiam la bieno iĝis posedaĵo de la nobela familio Ferrière en 1878, gravas al la nova okupanto de Grésillon doni al tiu malnova loĝejo novan aspekton.



En tiu-ĉi epoko, floradis kasteloj laŭ nov-gotika stilo kies iniciatinto estis la fama arĥitekto René Hodé. La novaj posedantoj do transformis la malnovan kastelon kaj videblas ankoraŭ hodiaŭ la aspekto de vasta rezidejo kun siaj kromkonstruaĵoj .

Post la dua mondmilito, multaj posedantoj de kasteloj devis vendi ilin, tiam oni bezonis konstruaĵojn por ebligi sociajn agadojn, ekzemple organizi somerajn feriejojn por la infanoj de la laboristoj, floris la « popola edukado ». Al tiu movado apartenis la esperantistoj, plimulte instruistoj, kiuj kreis nian societon por aĉeti la bienon en 1953. Sed nun,

multaj kasteloj kiuj sekvis similan destinon, ne plu estas posedaĵo de senprofita societo aŭ asocio pro la grandega kosto de bona renovigo. Nia Eo-societo tamen pluvivas kaj posedas tiun belegan bienon.

Hodiaŭ, la komitato elektita en 2010 klopodas sekvi vojon de malfermo al la socio kaj de longa uzo dum la jaro. Tiel ni povos konservi la Eo-kastelon, kies estonta profesia administrado certigos longdaŭran funkciadon.

Mi invitas vin esplori niajn ret-paĝojn « gresillon.org » por scii pli. Jannick Huet

Tarifs des séjours 2012

Programme (sur la base d'une semaine)

cours + activités	70 €
cours en demi-tarif jusqu'à 16 ans	35 €
activités culturelles seules	35 €

Logement (par nuit et par personne)

en grande chambre individuelle	36 €
en chambre individuelle	25 €
en chambre pour 2 personnes	18 €
en chambre pour 3 ou 4 personnes	14 €
en chambre pour 6 à 8 personnes	9 €
camping	3 €

Repas (demi-tarif jusqu'à 16 ans)

petit-déjeuner	4 €
déjeuner + café	10 €
dîner	9 €

Les forfaits tout inclus pour un séjour à partir de 6 nuits sont calculés à partir du tarif journalier avec un rabais de 5 %. Pour une inscription prise au moins deux mois à l'avance, le rabais est de 10%

Tarifs de location 2012

La M.C.E. propose aux groupes jusqu'à 50 personnes de louer le domaine. Nous avons établi une convention de location à un groupe avec les tarifs qui suivent. Les consommations d'électricité, d'eau et de fuel sont comprises dans les tarifs.

L'organisateur pourra faire préparer les repas dans la cuisine (avec les normes HACCP) par son propre personnel.

2 jours + 1 nuit	700,00 €
3 jours+ 2 nuits	970,00 €
4 jours +3 nuits	1 200,00 €
8 jours +7 nuits	2 000,00 €
salon Zamenhof et extérieurs	200,00 €
château sans les annexes(sans nuit)	300,00 €
château avec les annexes (sans nuit)	400,00 €
location de draps (par lit)	7,00 €

UN BEAU PROGRAMME D'ETE au château de Grésillon

- Restez 1 jour, 1 semaine ou 1 mois,
en juillet et août 2012

- Dormez dans une chambre ou sur le
camping

- Mangez végétarien ou pas.

21 - 28 juillet 2012

Semaine pour les artistes amateurs
avec théâtre, musique, danses, chant,
reliure, expression corporelle. Cours
intensifs d'espéranto, env. 5 heures
par jour

28 juillet - 4 août 2012

Semaine alternative - séminaire sur
la politique écologiste. Tourisme
vert, conférences et discussions sur
l'écologie et l'économie. Cours
modérés d'espéranto, env. 3 heures
par jour

4 - 11 août 2012

Semaine touristique culturelle. Cours
d'espéranto et de français le matin.

Excursions vers les châteaux de la
Loire l'après-midi

11 - 20 août 2012

Festival de théâtre de marionnettes
pour enfants, jeunes, familles.

Fabrication de marionnettes et
spectacles en soirée avec Christoph
Frank.

Cours de guitare et improvisation.

Musique, sport, jeux et cours
d'espéranto (Cseh)

Plus de détails à :

<http://gresillon.org/ete>

CONTACTS:

téléphone-répondeur : 02.41.89.10.34

courriel : kastelo@gresillon.org

Maison Culturelle de l'Espéranto
Château de Grésillon

49150 SAINT MARTIN D'ARCE

* * * * *

A PROPOS DE L'ESPERANTO

Conçu pour être réellement
international et très facile à
apprendre, parlé par des millions de
personnes sur les 5 continents,
l'Espéranto offre une expressivité et
une précision qui expliquent son
emploi actuel dans les domaines
techniques, scientifiques, littéraire,
musical, touristique Ce sont aussi
les valeurs intrinsèques de la langue,
à savoir l'ouverture, la curiosité de
connaître d'autres cultures, la
volonté de protéger les autres
langues et la promotion de la paix
dans le monde, qui expliquent que
l'UNESCO a par 2 fois en 1954 et
1985, voté des résolutions en faveur

de la langue et encouragé les nations
de l'ONU à l'enseigner.

« L'Espéranto est en mesure
d'exprimer les nuances les plus
subtiles de la pensée et du
sentiment, il est propre à
permettre, par conséquent,
l'expression la plus juste, la plus
littéraire, la plus esthétique et de
nature à satisfaire les esprits les
plus ombrageux et les plus
particularistes, et il ne peut pas
porter ombrage aux fidèles des
langues nationales. » Maurice
Genevoix, ancien secrétaire
perpétuel de l'Académie
Française.

J.B.

Le **4 juillet**, à l'Université Paris 13
Christian LAVARENNE a soutenu
une thèse de doctorat en histoire
contemporaine sur
"l'idée interne" de l'espéranto*
devant un jury composé
des Professeurs Eric VIAL, et Loïc
VADELORGE,
de M. Renato CORSETTI, Professeur
émérite,
et du Professeur Jean-Claude
LESCURE, Directeur de thèse.

Titre de la thèse

*Espéranto : Son idée interne dans ses
origines et quelques-unes de ses
expressions et manifestations
(aide ou obstacle à la diffusion de la
langue ?)*

Titolo en Esperanto : «Esperanto :
La Interna Ideo en siaj originoj kaj
kelkaj el siaj esprimoj kaj
manifestiĝoj (helpo aŭ obstaklo en la
disvastigo de la lingvo ?)»

Résumé de la thèse

La thèse étudie, dans le mouvement qui promeut et utilise la langue internationale auxiliaire dite *Esperanto* – du pseudonyme dont son inventeur, (Louis) Lazar Markovitch (ou Lejzer Motelev) ZAMENHOF, a signé son 1^{er} manuel (1887) –, l'existence et le rôle d'une *interna ideo*, d'abord définie par celui-ci comme "*la fraternité et la justice entre tous les peuples*" (1906).

L'auteur étudie l'influence des origines socio-familiales (judéité), puis du tolstoïsme, sur l'inventeur, qui a d'abord rêvé à la fondation d'un *hilelismo* (du nom de Hillel l'Ancien, contemporain de Jésus) puis d'un *homaranismo*, "pont neutre entre les religions" (comme l'espéranto se veut un pont entre les langues), tous deux refusés par les espérantistes. La moins précise idée interne, en général bien acceptée, s'est enrichie d'un idéal de neutralité tolérante et de paix, la langue a été proposée à la Croix-Rouge et a servi à l'accueil d'enfants, la solidarité permettant de sauver plusieurs membres juifs (correspondances inédites).

Après la mort de l'inventeur (1917), l'idée, liée à des lieux de mémoire (Białystok, ville de naissance de Zamenhof, sa tombe à Varsovie...), a été portée, entre autres, par la poésie et la littérature originales ; entre les deux guerres par le mouvement *Konkordo* (surtout en Pologne). La langue a reçu un accueil favorable chez des scientifiques français (soutien de membres de l'Académie des Sciences) – en partie à travers un réseau d'anciens dreyfusards ? –, puis dans des mouvements internationalistes (SCI, AUI...)

Malgré des manifestations (drapeau, hymne...) ayant pu repousser, les quelques serments de "réunifier l'humanité" ont été un

gage, sinon toujours d'expansion, du moins de durée.

Resumo en Esperanto

Temas pri la ekzisto kaj rolo de la "Interna Ideo" de Esperant(ism)o, unue difinita kiel "frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj" (2-a UK, Genève, 1906), de (Ludoviko) Lazar Markoviĉ (aŭ Lejzer Motelev) ZAMENHOF. La tezo studas la influon de la familia kaj socia origino (judeco), kaj poste de tolstoĵismo, sur la elpensanton de Esperanto, kiu unue revis pri fondo de hilelismo (laŭ la nomo de Hillel la Maljuna, samtempulo de Jesuo), kaj poste de homaranismo, "neŭtrala ponto inter la religioj" (kiel Esperanto volas esti neŭtrala ponto inter la lingvoj), ambaŭ rifuzitaj de la esperantistaro. La malpli preciza interna ideo, ĝenerale akceptata, sorbe inkludis idealon de tolerema neŭtraleco kaj de paco ; la lingvo estis proponata al la Ruĝa Kruco kaj servis en la sava gastigado de aŭstraj infanoj, ĉefe en

Hispanio ; kaj la solidareco (Interhelpo de UEA) ebligis la forsavon de pluraj judaj esperantistoj (laŭ neeldonitaj korespondaĵoj). Post la morto de Zamenhof (14-4-1917) la ideo, aparte memorigita en rilato kun lia naskiĝtago kaj liaj tombo en Varsovio kaj naskiĝurbo Byałyostok (UK-oj 1927, 31, 37, 59, 87, 2009), restis viva unue dank'al la Rondo(j) "Konkordo", ĉefe en Pollando ĉirkaŭ la familio Zamenhof (Klara, Leono, Felikso, Lidja). Intermilite en Francio la lingvo estis favore akceptata kaj subtenata – eble pere de reto de DREYFUS-defendantoj ĉirkaŭ Gaston MOCH kaj poste Paul PAINLEVE – de 42 anoj de la Scienca Akademio. Esperanto disvastiĝetis ĉe Libervola Civila Helpservo Internacia ktp. Malgraŭ strangajetoj (himno, verdaj flago kaj steloj...) kiuj eble repuŝis neesperantistojn, kelkaj ĵuroj "reunuigi la homaron" estis garantio, se ne ĉiam de progreso, almenaŭ de daŭro.

Christian LAVARENNE

* * * * *



La photo d'un stand espéranto à l'Université de Lomé (Togo). La jeune femme tend, à bout de bras, la revue ESPERANTO-info, montrant qu'elle arrive bien.

Francis BERNARD, Président de l'association ESPERANTO-info 48210 Mas Saint Chély <http://www.esperanto.info>

P.S. Abonnement d'essai pour 6 mois: 10 euros ; pour un an: 20 euros et plus si vous faites un don.

Eŭropa Tago de lingvoj - en la Pola Parlemejo

de: etsuo mijoshi <e.miyoshi@swany.co.jp>

Karaj, hodiaŭ mi ekhavis grandan kaj bonan surprizon. Post longa negocado kun la vicprezidanto de la pola senato, prof. Edmund Wittbrodt, la pola parlamento akceptis esti la sidejo de la festado de la Eŭropa Tago de Lingvoj la 26-an de septembro kun la temo 125-jariĝo de Esperanto. Unika okazo por nia movado!

La tutan eventon kunordigas EDE-PL kaj mi. Kore, Etsuo Mijoshi

Le conseil d'administration de la Fédération Languedoc-Roussillon d'Espéranto

Elektitaj/élus la 18an de aprilo 2010 en Vergèze (renovigo en 2013)

Bichon Véronique

Carbonnel Colette

Mouré Christian « redaktoro/rédacteur » de SFS

(15 rue du Verdier 34120 Tourbes xianmoure@orange.fr)

Passarella J-François prezidanto : président

(10 passage J. Ferry 34290 SERVIAN jf.passarella@free.fr)

Perez y Sanz Maria kasistino/trésorière

(13bis, rue Haute 30310 Vergèze maria.perez@orange.fr)

Elektitaj/élus la 21an de majo 2011 en Béziers

(renovigo/renouvellement en 2014)

Bernard Francis, Bernard Monique, Boccadifuoco Josée, Bourquin Frédéric, Eysseric Serge, Mraihi Zohra

Elektitaj/élus la 31an de marso 2012 en Nimes

(renovigo/renouvellement en 2015)

Banaszek Evelyne, Bony Jeannine, Esclapez Laurence, Hénin Jean

Lagrange Arnosekretario/secrétaire:arno.raymond.lagrange@gmail.com)

Taupiac Pierre

Ministerio de Turismo rekonas esperanton kiel laborlingvon.

Esperanto estis rekonita de la **brazila** Ministerio de Turismo kiel laborlingvo. Laura Pereira de Alcântara estas la unua brazila profesiistino kiu portas la flagon de neŭtrala helpa lingvo en ĝia nova identigilo de regiona turisma gvidilo. Nun, ŝi rajtas labori en la ŝtato de Rio de Janeiro uzante Esperanton, kune kun la aliaj lingvoj kiujn ŝi parolas. Laura laboras en du manieroj. Krom la komuna aktiveco en la turisma areo, kunordigante la projekton Konu Rio Piede, kiu kondukas grupojn de brazilanoj kaj eksterlandanojn vizitante la historiajn lokojn de la ŝtata ĉefurbo, iu dulingva promenado tra 'subĉiela muzeo'. La iniciato havas la apogon

KIEN NI IROS ? : **FESTIVAL du ROC CASTEL**

**Au Caylar, sur le Larzac, « Hommage
aux voyageurs lents ! »**

**Le FESTIVAL du ROC CASTEL (jeudi 26
juillet – mercredi 1^{er} août 2012) et sa 3^{ème}
édition du « Café des Voyageurs »**

21H30 - CONCERT de JOMO

Voir un concert de Jomo, c'est s'embarquer pour un
étourdissant voyage, plein d'humour
et de fantaisie. Son cheval de
bataille, les langues, les idiomes,
les dialectes, les jargons, les argots
et les patois bien sûr. Mais aussi
l'expression d'une certaine idée de la
vie... de tendresse (un peu), moquerie
(beaucoup), exaspération parfois et
ÉNERGIE toujours.



www.jmlecleroq.eu

Le « Festival du Roc Castel » se déroule au Caylar, petite commune de 425 habitants, située dans la partie héraultaise du Plateau du Larzac (40 km au SE de Millau, 70 km au NO de Montpellier). A ce festival constitué d'un ensemble d'activités et de spectacles culturels divers (musique, ateliers, découverte du patrimoine local, animations diverses) se déroulant sur la place du village, nous avons ajouté depuis 2010 un thème, celui du « **voyage lent** » créant ainsi le « **Café des Voyageurs** », un ensemble de récits de voyages, de moments d'échange, d'expositions.

La partie essentielle du « Café des voyageurs », à savoir **18 récits de « voyages lents »** qui nous feront

détails sur le site www.festival-roc-castel.eu (vous pouvez également consulter le site

<http://www.scoop.it/u/cafe-des-voyageurs>)

Estimataj gesamideanoj, Mi havas la plezuron sendi al vi la programon 2012 de nia festivalo. Ĉi jare, ni petis al JOMO reveni por fari veran koncerton (le *vendredi 27 juillet à 21h30*). Estos en la dua tago, la 27an de julio. Ĉar lastjare, li kantis dum manĝo, do li ne povis prezenti lian tutan talenton.

Bonvenon al Le Caylar.

Hubert Martin

rêver et qui seront présentés par leurs auteurs se déroulera du **vendredi 27 juillet au soir au mardi 31 juillet.**

Le festival est porté par la « Communauté de Communes Lodévois et Larzac » et la « Commune du Caylar ».

La programmation du « Café des Voyageurs » est proposée et mise en œuvre par l'association « Larzac Village d'Europe »

L'accès à tous les éléments de cette programmation est libre et gratuit. (sauf la balade contée du samedi soir) *Pour l'hébergement, il existe un camping au Caylar :*

<http://www.camping-domainedestempliers.com/#>

Cordialement et bienvenue au Caylar. *L'équipe du festival, Rens. : 06.75.83.45.02 - 06.76.60.44.89*

Resumo:

En antikveco, laŭ la mediteranea bordo en suda Gaŭlio, estis civilizo nun ne bone konata. Tamen ni disponas pri multaj arkeologiaj spuroj kiuj iom kompensas la mankon da historiaj dokumentoj:

Helenoj kaj Romianoj apenaŭ menciis aŭ priskribis ĝin. Esplorataj estas pluraj dekoj da lokoj, antikvaj urboj, opidumoj dank' al kiuj ni nun iom ekscias pri tiuj praloĝantoj. Aparte interesa informriĉa kaj promesplena estas la opidumo de *Pech Maho* pro ties subita detruo kiu, ve por la tiamaj loĝantoj, sed feliĉe por la historiistoj, postlasis tre multajn objektojn kaj klarajn spurojn.

Malkovrita nur en 1913, serioze ekesplorata per malprecizaj metodoj de 1948, ĝi estas pli sisteme studata de 2000.

Ŝlosilvortoj : Gaŭlio, opidumo, mediteranea prahistorio, fosesploroj.

Teleskopo- Internacilingva Scienca Revuo. Ce: www.teleskopo.com Tria eldono, 2011

1 Sudgaŭla marbordo kaj Langvedoko
Temas pri regiono ĉe mediteranea marbordo de Pireneoj ĝis Rodano kiu dum la jarcentoj estis ero de diversaj regnoj kun malsame difinitaj limoj. La nuna grava limo inter Francio kaj Hispanio situas laŭ la Pireneoj. Antaŭ


Résumé

Dans l'Antiquité sur les rivages méditerranéens de la Gaule il y avait une civilisation qui nous est peu connue. Cependant nous disposons de traces qui compensent un peu l'absence de documents historiques. Si les auteurs grecs et romains en ont à peine parlé et l'ont peu décrite, les fouilles de plusieurs dizaines de sites, cités antiques et oppida ont livré quelques données sur ces populations anciennes. L'oppidum de Pech Maho est à cet égard particulièrement intéressant et fort prometteur, ayant déjà livré de riches informations du fait de sa destruction brutale qui, si dramatique qu'elle ait été pour ceux qui l'ont subie, est une aubaine pour les archéologues qui ont pu mettre à jour une quantité considérable de mobilier et de vestiges. Découvert seulement en 1913 ce site a fait l'objet de fouilles à partir de 1948, et depuis l'an 2000 avec des méthodes encore plus rigoureuses.

Mots-clés: Gaule, oppidum, protohistoire méditerranéenne, fouilles archéologiques.

la tempo de la Romianoj rolis kiel limo la rivero Herault kiu disigis Masalianojn de Iberoĵ. En aliaj tempoj la grava politika limo situis je Korbieroj kiu ekzemple disigis francajn kaj aragonajn reĝlandojn dum Mezepoko ĝis la regado de

Ludoviko la 14a. Tamen plurfoje en la historio kvazaŭ samgranda regiono ekzistis kun similaj sed ne identaj limoj: la romia Narbona provinco, visigota Septimanio, reĝtempa Langvedoko kaj nuna administra regiono Langvedoko-Rusiljono. La regiono kiun oni iam eknomis Langvedoko estas karakterizita per sia situo kiel trapasejo de vojoj : de Italio kaj de Nordo tra la Rodana



Langvedoko estas vojkrucio inter Italio Rodano Atlantiko kaj Iberio

valo al Hispanio laŭ la Mediteranea marbordo, kaj al Okcidento sekvante la valojn de Aldeo kaj Garono.

Pro tio en la regiono aperis tre diversaj popoloj, kaj ĝi fariĝis sinsekva posedaĵo de diversaj regnoj: Masalianoj, Iberoj, Romianoj, Visigotoj, Maŭroj, Frankoj, Reĝlando de Aragono, Graflando de Tuluzo, Francaj Reĝlando kaj Respubliko. En antikveco la regiono estis loĝata de popoloj kiujn la Helenoj kaj la Romianoj nomis Keltoj, Iberoj, Liguroj, Elisikoj kaj Gaŭloj kaj kiuj havis komercajn rilatojn kun Helenoj, Etruskoj, Fenicoj, Iberoj.

Tamen per tiuj nomoj, ne estas klare kiuj estis tiuj loĝantoj: ĉu temas pri apartaj popoloj, ĉu temas pri diversaj nomoj por parencaj popoloj? La vortoj uzataj respektive de Helenoj kaj Romianoj estas malprecizaj kaj ne ĝuste informas pri la nomataj etnoj¹. Estas supozeble ke la situacio estis komplika: iuj popoloj vivis en la regiono ekde la komenco de la Ferepoko kaj aliaj popoloj venis poste el aliaj regionoj, kaj iliaj kulturaj trajtoj pli malpli miksiĝis. Keltojn oni nomas popolaro kies kultura lulilo troviĝis en centra Eŭropo kaj de tie vaste etendiĝis en diversajn direktojn al britaj insuloj, ibera duoninsulo, norda Italio, malgranda Azio, nunaj Francio kaj Germanio.

Sekvota...



Komparo inter limoj de Narbona romia provinco, visigota Septimanio kaj reĝtempa Langvedoko

<http://halshs.archives-ouvertes.fr/docs/00/10/21/33/PDF/3-Garcia-Budapest.pdf> *Définition et caractérisation, Dominique GARCIA, Actes de la table ronde de Budapest 17-18 juin 2005, éditions Bibracte, Glux-en-Glenne, Francio, 2006*